

Respondo al salutvortoj, II.

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1984 decembro 13 kaj 15.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-136/Radiokasedo-136-2-854-1985-januario-Claude-kaj-Andree-GACOND-Respondo-al-salutvortoj-II.mp3>

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond nome de Svisa Radio Internacia.

Kiel la pasintan semajnon ni babilos kun niaj perondaj amikoj, kiuj perkoresponde atentigis nin pri sia ekzisto kaj pri siaj reagoj al niaj prelego.

A.- Vi sciu, karaj geaŭdantoj, ke la dumonata interna organo de Svisa Radio Internacia donas statistikojn pri la ricevita korespondaĵoj. Jen ekzemple la statistikoj por la monato junio. Por doni al vi ideon pri la situo de esperanto en tiu interlingva konkursado, ni listigu la lingvojn laŭ ilia statistika ordo. Unuarange troviĝas la angla kun 400 korespondaĵoj, tio estas 32 procentoj komo 4 de la ricevita leteroj kaj poŝtkartoj. Do la triono de la skribaĵoj alvenas en la angla lingvo. Sekvas duarange la portugala kun 313 korespondaĵoj, 21 procentoj komo unu, triarange la germana kun 177 korespondaĵoj, 11 procentoj komo naŭ, kvare la araba kun 146 korespondaĵoj, 9 procentoj komo 8, kvine la hispana kun 125 korespondaĵoj, 8 procentoj komo 4, sese la franca kun 119 korespondaĵoj, 8 procentoj, sepe la itala kun 82 korespondaĵoj, 5 procentoj komo 5, kaj fine je la oka rango esperanto kun 36 korespondaĵoj, tio signifas 2 procentojn komo 4 de la ricevita leteroj kaj poŝtkartoj.

Cl.- Komparo kun la monato junio de 1983 montras tre grandan stabilecon, tiam alvenis en esperanto 40 korespondaĵoj, 2 procentoj komo 5.

A.- En julio 1984 alvenis en esperanto nur 27 korespondaĵoj, 1 procento komo 7, kontraŭ 30 korespondaĵoj en 1983, kio reprezentis 2 procentojn komo 4.

Cl.- En aŭgusto ni havas tiujn ĉi nombrojn por esperanto. En 1984 43 korespondaĵoj aŭ 2 procentoj komo 7 kaj en 1983 37 korespondaĵoj aŭ 2 procentoj komo 6.

A.- Kaj fine jen la situacio por la septembra monato. 1984: 21 korespondaĵoj, 1 procento komo 5. 1983: 48 korespondaĵoj, 3 procentoj komo 7.

Cl.- Tiuj ĉi statistikoj montras do, ke esperanto estas la lingvo uzata de ĝenerale 2 %-oj de la skribemaj aŭskultantoj de nia Svisa Radio Internacia. Fakte tiu ĉi procentaĵo rezultas unuflanke de la elsenda situacio de esperanto, kiu tutcerte havas je dispono multe malpli ol 2 %-oj de la elsenda tempo, kaj aliflanke de la objektiva eteco de la nombro de la esperantistoj. Ĉiu pasiveco flanke de la esperantistoj kreskigas la impreson, ke esperanto estas la afero de preskaŭ sensignifa lingva minoritato. Kontraŭe ĉiu perletera vivosigno influas en pozitiva senco la statistikojn favore al esperanto. Kresko de la esperanto-procentaĵo en la menciitaj statistikoj nur povus esti favora al la poresperanta programo, dum malkresko povus havi negativan rezulton.

A.- Tiu simpla vero revenigu nin al la leterujo, kiu plenetas. Ni salutu la tre aktivan "Cercle espérantiste de l'Agenais" en Laroque Timbaut, Francio, kiu estas fakte la broŝurservo de SAT. De ĝi ni ĵus ricevis kvindekpaĝan broŝuron titolitan ALVOKOJ AL LA HOMA KONSCIENCO. La ses tiel publikigitaj alvokoj estis lanĉitaj de malsimilaj organizaĵoj. Ili celas rikoltadon de subskriboj. Ni donu ilian temon :

Cl.- "Tute antinukleaj, kodo de scienca deontologio, alvoko al la homoj, reguloj de deontologio pri laboro, individuaj liberecoj, kodo de komunika deontologio.

A.- Espereble tiu broŝuro konigos tiujn ĉi alvokojn almenaŭ interne de la SAT-movado. La deklaro de ĝia 57-a kongreso okazinta en Bordeaux, Francio komence de la monato aŭgusto 1984 memorigas prave ke "la juna Zamenhof iniciatis la Internacian Lingvon ne por kontentigi intelektan aspiron sed por kontraŭbatali la malamon inter la gentoj."

Cl.- S-ro Vurpillot en Bourges, Francio, kiu skribis por ricevi la programon de nia Radio, same kiel multaj aŭskultantoj, eble jam ricevis la novan nacilingvan informilon en unu el ties versioj, kiuj eldoniĝas en la angla, franca, germana, itala, hispana, portugala kaj araba. Ilin konsultante oni konstatas, ke esperanto kaj la romanĉa lingvo dividas inter si la samajn momentojn.

A.- En Jugoslavio ni salutas Cvetanka Tubiĉ en Sid, kiu esprimas siajn bondezirojn por "plua sukceso en nia poresperanta laboro."

Cl.- Ana Molera en Moia, Hispanio, kutime aŭskultas nin jaŭde. Eble ŝi aŭdos nin, kiel la aliaj salutatoj. Inter ili ni menciis Jean-Pierre Vandendaele en Lissewege, Belgio, kiu dankas pro la alsendo de la Monata Cirkulero de Kultura Centro Esperantista. Tiun ĉi kulturen organon ricevos ĉiuj aŭskultantoj, kiujn ni pasintsemajne, ĉisemajne kaj venontsemajne salutis aŭ salutas. En ĝi estas troveblaj artikoloj, kiuj redonas la esencon de kelkaj el niaj radio-prelegaroj, kaj ni scias, ke niaj aŭskultantoj ŝatas ilin tralegi.

A.- En Aŭstrio ni salutas Martin Stuppniĝ en Arnoldstein, kiu atentigis pri la trilandan esperanto-konferencon tiam okazonta en Treviso en Italio. Espereble li sendos al ni raporton pri tiu aranĝo. Fakte la esperantistoj devus same peni por informi pri okazintaĵoj, pri okazintaĵoj, ĉar tiuj raportoj povas havi intereson por vasta publiko, dum la anoncoj nur interesas feriantojn kongresemajn.

Cl.- Enzo R. Ariani en Firenze, Italio, salutis nin per komplimentoj "pro la sukcesa plenumo de nia laboro" kaj li trovas niajn radioelsendojn interesaj.

A.- Jean Cruchon en Longjumeau, Francio, aŭdis nian elsendon pri la vivo kaj agado de Ivo Lapenna. Ni dankas lin pro lia aŭskult-raporto. Same ni dankas pro aŭskult-raporto s-ran Petro Cugny en Dijon, Francio kaj tutan grupon da sukceskriantoj: C. Bourlet, C. Jauvenet, Y. Grivot, H. Journet kaj S. Cugny.

Cl.- D. B. Gregor skribas, ke niaj elsendoj estas kapteblaj klare kaj forte en lia urbo Northampton, Britio.

A.- Günter Conrad en München, Germanio okcidenta, eldonas cirkuleron titolitan DX-Infomilo, kiu raportas, pri ĉiuj esperanto-elsendoj kurondaj en la mondo. Tute certe utila infomilo, des pli, ke ĝi aperas ne nur en esperanto, sed ankaŭ en la germana kaj angla lingvoj.

Cl.- Fine, hodiaŭ ni laŭtlege erojn el poŝtkarto veninta el la Esperanto-Klubo Esperanto en Leningrado, Sovetio: Estimataj samlingvanoj! Nia klubo ĝojas ricevi de vi signon de atento, nun prospekto de via Radio. Ni plezure havas kontakton kun esperantistoj el via bela lando, kiu estas ŝatata de ni des pli, ke ĝi estis rifuĝlando de nia lidero V. I. Lenin... Multaj niaj

klubanoj aŭskultas vian radion. Ni konsentas kun via malrapida maniero de parolado, ĉar esperanto estas lingvo ĉies kaj nenies. Ĉion bonan al vi de kluba estrarano V. Nazarov.

A.- Ni reciprokas tiujn bondezirojn.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. La venontan semajnon Claude Gacond intervjuos la plej maljunan aktivan esperantiston de Svislando. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), januaro 2014*